



Enhavo

- Zamenhof-tago, afiŝoj kaj legado
- CED renovigas sin
- Radio en Svislando revivigita
- Ondo kaj Ateismo kaj <Landa Parad'>

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-55 sendita el Budapeŝto, la 2an de decembro


Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.

Por tua uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Afiŝo por Z-tago elŝutebla

Baldaŭ venos la Zamenhofa Tago. Jen grava momento por prezenti nian lingvon al pli vasta popolo. UEA proponas tion pere de sia memstare aganta teamo ZPI. Rigardu la afiŝojn kaj elŝutu ilin por viaj bezonoj. Dezajnisto kaj realigo: Peter Oliver en Britio, koncepto Renato Corsetti.

Elŝutu kaj agu! Starigu manierojn por kapti la varbitojn, por helpi al la rejunigo de la komunumo!




Iom post iom la tuta listo de afiŝoj vidoblos en nubo ĉe:

<https://i.getspace.eu/cloud/index.php/s/w57kAqi9BDJN8SS>

Rapida aliro: [EspeReto.com](https://espereto.com). La konstanta adreso de tiu ĉi publikaĵo estas: <https://espereto.com/zt-2020-afish/> - ĝi estos aktualigata, kiam aldoniĝos novaj afiŝoj. La listo de afiŝoj aperos tie en pli klara maniero, kun bildoj kaj priskriboj.





ILEI - Komuna Legado por la Zamenhofa Tago

Temas pri la poemo 'Dialogo' de Julia Sigmond. Vidu en www.ilei.info ĉefpaĝo supre dekstre. Tie vi trovos la poemon. Sur la bildo: la lasta libro de la 90-jara aŭtoro.

Pluraj ŝiaj libroj mendeblas de UEA:
<https://katalogo.uea.org/katalogo.php>

CED-malceda laborado – aktualaj informoj

Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) nun konsistas el Konsilantaro, kiun nomumas la Estraro de UEA. Tiu Konsilantaro nun konsistas el jenaj homoj: Xavi Alcalde, Irene Caligaris, Renato Corsetti, Mark Fettes, Guilherme Moreira Fians, Michele Gazzola, Federico Gobbo, Kimura Goro, Alessandra Madella, Mélanie Maradan, A Giridhar Rao, Orlando E. Raola, Ida Stria, Angela Tellier, Humphrey Tonkin kaj Bernhard Tuidier. El inter la anoj de la Konsilantaro, malgranda estraro respondecas pri ĉefaj agadkampoj:

1. Esperantologio kaj interlingvistiko - Guilherme Moreira Fians (Esperantologiaj Konferencoj, revuo "Esperantologio")
2. Lingvopolitiko, precipe en internacia/interŝtata kadro - Michele Gazzola (LPLP, Nitobe-simpozioj)
3. Universitataj studprogramoj (pri Eo kaj rilataj temoj) - Angela Tellier (precipe kunordigo de projektoj por subteni/disvastigi tiajn programojn)
4. Bibliotekoj - Orlando Raola (Biblioteko Hodler; kaj aliaj)
5. Terminologio - vaka (rilatoj kun TermNet, Infoterm; terminologia trejnado)

Radio en Svislando denove aŭskultebla

Radio pri Esperanto en Svislando havas egan historion. De jardekoj la profesiulo Arthur Baur sendadis programojn pri kaj en Esperanto. Jen foto de Arthur kaj la edzino Heidi antaŭ la mikrofono de SRI (Svisa Radio Internacia) en 1982. Tiu regula rubriko vivis tra jardekoj kaj daŭris ĝis 1991.

Ekde la 7a de novembro 2020 ni havos post longa tempo denove Esperanto-radio-programon en Svislando:

<http://informejo.com/esperanto-en-radio-kanal8610.html>



La sendoj okazos ĉiun duan sabaton ĉe radio **Kanal8610** je la 16:00 CET (ripeto je 19:00)

La programo konsistas el 7-minuta Esperanto-kurso por germanlingvanoj, kiun sekvos post muzika paŭzo kultura elsendo kun intervjuoj, libroprezentaĵoj kaj novaĵoj el Esperantujo kaj Svislando.

Dietrich Michael Weidmann

Virtuala Ondo – alvenanta al plaĝo apud vi

Ĝus aperis en la reto demonstra pdf-versio (demoversio) de la aŭtuna eldono de “La Ondo de Esperanto”. La 46-paĝa demoversio enhavas kelkajn plenajn tekstojn kaj plurajn tekstofragmentojn el la rekorde ampleksa 123-paĝa aŭtuna “Ondo”, publikigita komence de oktobro. Legu pli ĉe: <https://sezonoj.ru/2020/11/ondo-70/>

ATEO – la ateistaj esperantistoj raportas

Oktobrofine okazis la jarkunveno de ATEO. La virtuala formo per Zoom rezultis partoprenon de pli ol 50 membroj, kiu multe superas la nombron de la tradiciaj kunvenoj dum UK-oj. Dum la kunveno oni elektis novan estraron, decidis lasi la membrotizon neŝanĝita, kaj diskutis ĉu la revuo aperadu surpapere aŭ elektronike. Pro la spertitaj avantaĝoj de la virtuala formo la grupanoj konsentis pri tio, ke la kunvenoj estonte okazu ĉefe per Zomo, pli ofte, kaj ankaŭ persone dum UK. Interesa subtemo estis: "Kial ni membras en la Esperanta organizo ATEO? Ĉu por esti simplaj abonantoj de nia revuo, aŭ ni volas iom pli? Kio estas la baza celo de la organizo?" Por interesiĝantoj mi proponas enkondukan artikoleon ĉe: <https://bit.ly/2TZkDyL>

La retejo (*kun informoj, revuo, aliĝilo, ktp*) de ATEO estas trovebla ĉe: <http://ateisto.org> -
Kontakt-adreso, sekretario:, anna.lowenstein@esperanto.org

Anna Lowenstein

Korektoj de <Landa Parad’> en Eŭropo:

- Hispanio, HEF: Prezidanto: **Ángel Arquillos**
- Finnlando: nova ĉefdelegito kaj kotizperanto: Paula Niinikopi, Pori.
- Finnlando: reteja diskutejo: ‘Finna Babilejo’ <https://finnababilejo.fi/>
- Finnlando, kluboj: restas kvin, ne plu validas Jyvaskala.
- Finnlando: la finna ILEI-sekcio ĝus formale malfondis sin.

Se estas pliaj misoj aŭ malaktualaĵoj por <Landa Parad’> por Eŭropo, Azio aŭ MONA, bv. sendi ilin al mi! Inter mia lavango da taskoj por la lasta semajno de decembro estos reaktualigo de tiuj tri registroj. Ekde la komenco de januaro ekos la ĝisdatigo de <Landa Parad’> por Afriko kaj Ameriko.

Stefan MacGill

===== vortoj: 660 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: [<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>](https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/).

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.